

Protokolo de la 41-a senatkunsido (35a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de XII, 44a post la fakta eklaboro) okazinta dum SUS 21 en ĉambro de la paroĥejo en Rimini-San Giuliano Mare (I) dimanĉon, 1999-08-29/1698pFR, 14:30 - 17:30 h kun daŭrigoj ĝis 1999-11-28 en Berlin, 15:30 h fine de la "Berlina Novembro" (Stachowiak-Simpozio).

Ĉeestis la senatanoj Frank (en Rimini kaj Berlin), Holdgrün, Lewoc, Maitzen, Minnaja, Pennacchetti, Quednau (en Rimini) kaj Wickström (en Berlin).

0 *Formalajoj.*

Ne estis ŝanĝproponoj de la protokolo de la 40-a kunsido (vd. GrKG/H 40/3, sept. 1999, pj 141 – 142).

1 *Decidoj*

Pro tio, ke neniu kandidatighis por SUS 21 ne necesis starigi ekzamenkomitaton kaj ekzamenkomisionojn.

La Premion Pirlot ricevu la terminologia verkaro de OProf. Wim de Smet. La Akademia Forumo antaŭvidita kun la partopreno de S-ro Pagano pri ties projekto 2020 pro lia nealveno okazu kiel interna interkonsiliĝo pri la temaro tuŝita de ĉi tiu projekto.

La prezidanto alvoku, se la kondiĉoj estas jam plenumitaj kaj la alvoko ne jam okazinta, en pli altan rangon, nome kiel plenrajtajn membrojn (OProf.) aŭ kiel asociitajn profesorojn, la ISKanojn Albano, Dr. Angstl, Bojaĝieva, Dr. Bormann, Eichhorn, Korĵenevskaja, La Torre, Makabe, Roux, Uruena Alvarez, Wandel. La prezidanto petas la dekanojn aŭ iliajn kunlaborantojn en la koncernaj sekcioj helpi en la kontrolo de la plenumiteco de la kondiĉoj kaj verki po malmultajn liniojn por la aktoj, kiuj reliefigas la sciencon kaj personan indecon.

2 *Invito al la Ŝtata Sekretario pri Publika Instruado kaj Kulturo.*

La Senato konstatas la gravecon de korektaj rilatoj al la registaro de San Marino, kvankam la scienca laboro de la Akademio estas tute sendependa de ajna politika influo el la Respubliko de San Marino aŭ de alia lando. Oni akceptas unuanime la inviton je interparolado, kiu okazis en San Marino lundon posttagmeze, la 30an de aŭgusto.

3 *Diversaĵoj.*

La Senato konfirmas la okazigon de SUS 22 kunlabore kun ĈAIS dum pentekosto 2000 en Hradec Kralov (CZ) kaj de SUS 23 kunlabore kun RAIS en la lasta septembra semajno 2000 en Sibiu (RO). Studadsesion en Rimini/San Marino oni ne okazigu 2000 sed ja 2001, post restrukturigo de la loka portanta asocio ("promotori") laŭ la ŝanĝita leĝo de RSM pri asocioj.

La ĝisnuna trezoristo provizore daŭrigos sian laboron ĝis la distribuo de la taskoj en la nova senato. La ĝisnuna prezidanto retpoŝte faros antaŭ la fino de decembro sugestojn al la nova senato pri la pliefikigo de la laboro kaj konforma nova disdivido de la roloj, por ke ekde la januaro 2000 ni havu strukturigitan funkciantan senaton, kiu estu prezentata per jarfina cirkulero de la nuna aŭ eventuale jarkomenca letero de la estonta prezidanto. La ĝisnunaj prezidanto kaj trezoristo renkontiĝos 1999-12-25/26 en Paderborn por finpritrakto de la transdonproblemoj de la agadoj al la nova, 8-persona senato.

Protokolis 1999-12-02: Frank, prezidanto.